

Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Mireille Grosjean

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:

Aleks André

Didier Apéléte Agbolo

Guy Camy

Marija Jerković

Dennis Keefe

Arlain Kizeyidioko M.

Ilona Koutny

Anna Lowenstein

Patrick Morando

Jérémie Sabiyumva

Honoré Sebuoro

Amri Wandel



ESPERANTO KAJ EDUKADO

ilei

La kultura heredaĵo de Esperanto

Madrido, 20-28 julio 2018



ENHAVO

Enkonduko (Mireille GROSJEAN)	3
Dennis KEEFE: <i>Praktika utiligado de la silentaj filmoj de C. Chaplin [...]</i> . 4	
Intervjuo kun la unua diplomito de RITE [kun Patrick Morando]	9
Grava anonco diskonigenda [ekzameno por blinduloj en Lisbono]	13
Mireille GROSJEAN: <i>Paroliligoj</i>	14
<i>Dek jaroj en Esperanto-lando (5.)</i> (Luiza CAROL, Mireille GROSJEAN) ...	16
<i>Esperanto per rekta metodo de Stano Marček</i> (recenzo de LOWENSTEIN) 19	
El la landoj kaj sekcioj (CN, FR, DE, IL, CD, HR, PL)	20
Mia neforgesebla lingvoinstruisto (Didier Apélté AGBOLO).....	31
<i>NOMADKURSO KAJ ESPERANTO-PLUS</i> (H. SEBUHORO, M. GROSJEAN) ..	32
<i>Du samtempaj AMO-seminarioj en Afriko</i> (Jérémie SABIYUMVA)	35
Informoj pri ILEI, redakciaj informoj	37

ESTRARO DE LA LIGO

- Prezidanto:** Mireille GROSJEAN „Mirejo”, Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <mirejo.mireille@gmail.com>. Tel. hejma (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 79 69 709 66. Rilatoj kun UNESKO kaj FIPLV. Observanto de ILEI ĉe UEA. Informado al ekstero. Ekzamenoj.
- Vicprez.:** GONG Xiaofeng „Arko”, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, CN-330031 Nanchang, Ĉinio. <arko.gong@qq.com>. Universitata agado.
- Sekretario:** Emile MALANDA NIANGA. P. O. BOX 2787 Cape Town 8000, Sud-Afriko. <emalandan@yahoo.fr>, <ilei.sekretario@gmail.com>. Kontakto kun sekcioj. Koleghelpa Kaso.
- Vicsekr.:** Elena NADIKOVA. ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. fiksa: (+7) 8352-648531, portebla: (+7) 919-670-25-34. <lena_espero@mail.ru>. Lerneja agado. Eo-centroj.
- Estrarano pri financoj:** William HARRIS „Vilĉjo”, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. hejma (+ 510) 653 0998.
- Estrarano:** Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. Tel. hejma (+381) 32 371053. <radojica.petrovic.rs@gmail.com>. Kongresoj de ILEI, rilatoj kun TEJO, retaj aferoj, „Interkulturo”.
- Estrarano:** Ivan COLLING. Cx.P. 1701, Ag. Mal. Deodoro, Curitiba, PR. BR-80011-970, Brazilo. <iecolling@yahoo.com.br>. Universitata agado.

Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,
Usono, University of Hartford;
AdE¹

Membroj:

Duncan Charters, Usono, Principia
College, Elsah

Renato Corsetti, Britio/Italio,
Università degli Studi di Roma
„La Sapienza”; AdE¹

Probal Dasgupta, Barato, LRU,
Indian Statistical Institute,
Kolkata; AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio,
Šiaulių universitetas

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Iłona Koutny, Pollando/ Hungario,
Uniwersytet im. Adama
Mickiewicza w Poznaniu; AdE¹

Stefan MacGill, Nov-Zelando/
Hungario, vic-prez. de UEA

Aleksandr Melnikov, Rusio,
Академия Сельскохозяй-
ственного Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio,
Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA
Nyelvtudományi Intézet

¹ AdE – Akademio de Esperanto

Sur la titolkovrilo: Nia kongreso ricevis emblemon kun la urso, simbola besto de Madrido. En la urbo vi povos vidi plurajn statuojn de tiu staranta urso. Okaze de la konkurso lanĉita de ILEI por obteni emblemon aperis kelkfoje virbovo memorigante pri taŭrobatalo, sed ankaŭ plurfoje la urso. La estraro elektis tiun simbolon, kiu rilatas al nia gastiganta urbo.

Enkonduko

Karaj legantoj,

Denove nia revuo ebligas al vi malkovri novajn aspektojn de la instruado de nia lingvo. Denove la kontribuајoj devenas el diversaj mondopartoj. Denove la kontribuantoj estas аŭ altnivelaj fakuloj pri pedagogio-andrologio (instruado al plenkreskuloj) (Keefe) аŭ simplaj instruistoj, kiuj raportas pri sia praktiko (Agbolo, Rotellini-Gaufilet k.a.), аŭ estas personoj, kiuj raportas pri sia lernado (Carol).

Same bunta estos nia programo en nia 51-a Kongreso en Madrido. Jam 150 personoj aliĝis kaj proksimume 30 proponis prelegon, ludon, prezenton, kantojn, dancojn k.s. Do nia ĉiujara evento estas promesplena kaj jam rekorda. Simpozio okazos fine de la semajno, per kiu ni klopodas ekrilati kun ekstermovadaj fakuloj.

ILEI ankaŭ aperos kadre de la UK en Lisbono kaj organizas tie la TAGON DE LA LERNADO. La temo de tiu TAGO estos „Aliro al kulturoj pere de la lingvo ESPERANTO”. Nia komisiito pri ILEI en la UK Marija Belošević eklaboris por prepari interesan Tagon. Ni revidos unu la alian ie en Iberio! Ĝis baldaŭ!

Ni deziras al vi agrablan legadon

Mireille GROSJEAN
Prezidanto de ILEI

Praktika utiligado de la silentaj filmoj de Charlie Chaplin por PAROLIGI gelernantojn de Esperanto je ĉiaj niveloj

de Dennis KEEFE, Cullera, Hispanio

En ĉi tiu artikolo, Dennis Keefe prezentas detalajn ekzemplojn montrante kiel silentaj filmoj povas esti utiligataj en ĉeestaj kursoj de Esperanto kiam la ĉefa celo de la instruado estas la praktikado kaj la paroligado de la gelernantoj. Kvankam senvoĉaj filmoj povas esti uzataj ankaŭ por helpi instrui gramatikajn regulojn de Esperanto, ili multe pli taŭgas por praktikado kaj paroligado de lingvaj eroj JAM lernitaj, sed ne sufiĉe flue uzataj de la gelernantoj en normala konversacio. Dennis unue prezentas tipajn demandojn kiuj povus esti starigataj de kursgvidantoj en tri malsamaj lernogrupoj je tri niveloj: baza kurso, meza kurso kaj supera kurso. Tiuj ekzemploj estas iom artefaritaj por montri la adapteblecon de la metodo. En artikolo en la sekva numero de IPR, estos prezentita modelo de kiel povas nature okazi praktikigado dum tipa leciono de mezgradaj kaj supergradaj gelernantoj de Esperanto.

En mia lasta artikolo en Internacia Pedagogia Revuo (*De Banalaj Bildoj al Sukoplenaj Silentaj Filmoj en la Instruado de Esperanto: Ĉoĉo (Charlie Chaplin) Helpos Vin Lernigi Esperanton!*), mi skribis pri la avantaĝoj utiligi silentajn, senvoĉajn filmojn, kiel tiuj faritaj inter la jaroj 1895 kaj 1930, por la praktikado kaj instruado de Esperanto. Mi substrekis, ke tia kursomaterialo povas esti uzata kaj de profesiaj kaj de amatoraj kursgvidantoj de Esperanto, kaj aldone, ke silentaj filmoj utiligeblas por ĉiaj niveloj: por komencantoj, por mezgradaj lernantoj kaj por lertaj parolantoj de la lingvo.

En tiu antaŭa artikolo mi donis ekzemplon de filmo nomata *Sortie de l'Usine* (Elirado de la Fabriko), farita de la fratoj Lumière en la jaro 1895. Uzante tiun ege simplan filmon, mi montris kiel per nur kvin sekundoj da filmo kursgvidanto povus starigi 15 demandojn pri ĝi. Tio estas, per malmulte da materialo de silenta filmo eblas paroligi gelernantojn multe.

Nun en ĉi tiu artikolo mi volas daŭrigi la prezentadon de konkretaj ekzemploj, utiligante la famajn filmojn de Charlie Chaplin inter la jaroj 1916 kaj 1936. Mi montros plurajn metodojn, alirojn, kiujn ĉiaj kursgvidantoj povas utiligi en sia kurso. Mi montros tipajn ekzemplojn de demandoj por

baznivela, por meznivela kaj por altnivela kursoj, alivorte por KER: A-nivelaj, B-nivelaj kaj C-nivelaj kursoj.



En la foto: Dennis Keefe kaj Lee Jungkee en la Seula Esperanto-Kulturcentro, kie okazis parto de la dumjara, eksperimenta kursaro kun la silentaj filmoj de Charlie Chaplin.

Kompreneble tiuj modeloj, kiujn mi sube prezentos, estas nuraj ekzemploj, kaj iom tro artefaritaj, ĉar mankas reala kunteksto, kun ĉeestaj partoprenantoj. Vi, la kursgvidanto, prefere uzos la filmojn spontane, adaptiĝante al via konkreta, loka situacio. Vi kreos viajn proprajn ekzemplojn laŭ la cirkonstancoj, en kiuj vi troviĝos. Kursoj, kiuj utiligas silentajn filmojn, estas kiel ĵazo-muziko, en kiu oni improvizas je ĉiu momento, ne kiel klasika muzika komponaĵo, en kiu ĉiu noto estas antaŭfiksita. Por plani la lecionon, vi povas unue spekti la filmon por bone kompreni tion, kio okazadas, sed vi NE devas skribi antaŭe ĉiujn demandojn en fiksa ordo. Ĉe preskaŭ ĉiu respondo de lernanto estas iom da surprizo, kaj vi kiel bona instruanto devas reagi al la fluo de la interagado kun viaj gekursanoj. Rigida demando-ordo

detruos tiun naturan fluadon. Bona, interesa, natura praktikado de lingvo bezonas altan nivelon de fleksebleco.

Estas diversaj manieroj montri la filmojn al la gelernantoj. Vi povas vidigi la tuton aŭ nur partojn. Mi persone ŝatas montri nur scenojn kaj subscenojn de mallonga daŭro, ĉar per du, tri, kvar minutoj de unu filmo, mi povas facile krei unu horon da interesa leciono. Unu sceno povos sufiĉi, kaj sceno de, ekzemple, du minutoj facile dividiĝas en subscenojn de nur kelkaj sekundoj. Se mi havus tri-minutan sekcion de filmo de Charlie Chaplin, mi povus iel uzi la sekvantan skemon: 15 sekundoj da rigardado + 10 minutoj da demandado kaj interparolado; poste, 20 sekundoj da rigardado + 5 minutoj da interparolado; post tio, 3 sekundoj da rigardado + 8 minutoj da interparolado ktp. ĝis la fino de la sceno. La ritmo de la leciono resumiĝas tiel: Spektado + Parolado: $S_1 + P_1$, $S_2 + P_2$, $S_3 + P_3$, ktp. Spertaj lingvo-instruistoj eble preferus interrompi tiun skemon per diversaj duopaj kaj grupaj laboroj, aŭ per skribaj ekzercoj kaj tiel plu. Estas senfinaj manieroj aranĝi la lecionon.

Mi ne rekomendas, ke vi uzu tiajn filmojn por fari tutan lecionon de unu aŭ du horoj. Tio estas tro longa, se vi ne spertas pri la metodo. Se vi volas eksperimenti en viaj lecionoj, provu utiligi la silentajn filmojn dum dek minutoj, dum kvin minutoj aŭ dum 30 minutoj, ekzemple. Miksi metodojn kutime plialtigas la kvaliton de la instruado, kaj simile plialtigas la intereson pri la kurso. Varieco de instru-metodoj estas trajto de bona instruisto. Sed kvankam mi rekomendas, ke vi uzu nur parton de via instruohoro por filmopraktikigado, sciui, ke eblas fari ne nur tutan lecionon per senvoĉaj filmoj, sed ankaŭ tutan, plurmonatan kurson per ili. Sed tio estas alia temo por alia momento.

Mia plej ŝatata maniero prezenti la filmon estas montri parteton post parteto. Ofte mi spektigas nur du aŭ tri sekundojn, kio sufiĉas por starigi abundajn demandojn kaj paroligi ĉiujn en la klasĉambro. En la sekva ekzemplo (el la filmo *La Cirko*), tamen, por la celo de ĉi tiu artikolo, mi elektas specimenajn demandojn, kiuj povas okazi en diversaj partoj de la sceno. Post tiu ekzemplo, mi aldonos duan ekzemplon (el la filmo *La Enmigrinto*), kiun ni povus nomi „Kurso-konversacio bazita sur dudek sekundoj da filmo”. En tiu lasta ekzemplo, pli klare videblas kiel grava estas spontaneco, interparolado, lernanto-partoprenado. Tiu dua ekzemplo donas sufiĉe bonan, sufiĉe aŭtentikan ekzemplon, pri tio kiel leciono uzanta senvoĉan filmon povas glate kaj nature disvolviĝi.

Nun, por doni al vi ideon kiuj povas esti la demandoj kaj komentoj, kiujn mi utiligas depende de la nivelo de la lernantaro: mi listigas abundan materialon sube en Ekzemplo I. Vi rimarkos, ke la motoro de la disvolviĝo de la leciono estas DEMANDOJ pri la filmo. Vi simile rimarkos, ke ne estas tradukaj laboroj dum la leciono. La tuto devas okazi nur en Esperanto. En tio la lecionoj utiligantaj senvoĉajn filmojn similas la Rektan Metodon. Tamen, memoru, ke ĉi tie la celo ne estas tiom instrui la lingvon kiom praktikadi ĝin longan tempon en sufiĉe natura konversacio.

Antaŭ ol rigardi la ekzemplojn, mi rekomendas, ke vi mem spektu la filmojn kaj la koncernajn scenojn de la ekzemploj. Mi indikis mian fonton, sed estas multe da similaj fontoj diversloke sur la interreto. La diferenco inter la diversaj kopioj de la sama filmo estas la muziko en la fono. Tiaj diferencoj ne ŝanĝos la lecionon.

Ekzemplo 1.:

Filmo: The Circus (La Cirko);

Sceno: The Lion's Cage (La Kaĝo de la Leono);

Daŭro: 3 minutoj kaj 44 sekundoj.

Fonto: Jutubo, https://www.youtube.com/watch?v=MVo_orLAMag

Ekzemploj de tipaj demandoj de instruanto al lernantoj:

Bazniveloj:

- 1) Ĉu tiu estas Charlie?
- 2) Ĉu tio estas leono aŭ ĝirafo?
- 3) Ĉu Ĉoĉo estas en aŭ ekster la kaĝo?
- 4) Ĉu li timas la leonon?
- 5) Ĉu la leono dormas?
- 6) Ĉu ĝi vekigis? 7) Kio venis al la kaĝo?
- 8) Kiu venis al la kaĝo? 9) Ĉu Ĉoĉo eskapis? 10) Kiel li eskapis?



Komento pri baznivela uzado: Simplaj frazoj kun simplaj vortoj. Rektaj respondoj de unu frazo.

Meznivelaj:

1) En la unua parto de la sceno, ĉu estas leono kiu ĉasas Ĉoĉon? 2) Kio devigis Ĉoĉon eniri en la kaĝon de la leono? 3) Kiam Ĉoĉo eniĝis en la kaĝon, kion faris la leono? 4) Kiam Ĉoĉo jam estis en la kaĝo, kial la leono ne priatentis lin? 5) Por kion fari, li eligis tukon el sia poŝo? 6) Kion la leono faris dum Ĉoĉo havis la problemon kun la hundo? 7) Kio okazis tuj antaŭ ol la leono vekigis? 8) Kiam Ĉoĉo timis la leonon, kaj kiam ne? 9) Kiamaniere Ĉoĉo povis eliri el la kaĝo? 10) Ĉu vi pensas, ke Ĉoĉo timis la tigron pli ol la leonon? Kial jes, aŭ kial ne?

Komento pri meznivela pridemandado: En la meznivela kurso, estas kompleksaj frazoj, subfrazoj. Ankaŭ estas demandoj kiuj iomete eliris al la baza situacio, ekzemple, demandoj pri opinioj. La respondoj de la lernantoj (ne indikitaj) probable estos multe pli longaj ol tiuj de lernantoj de la baza nivelo.

Superaj-nivelaj:

1) Priskribu la unuan parton de la sceno, antaŭ ol Ĉoĉo devis kuri al la kaĝo de la leono. 2) Enirinte la kaĝon, Ĉoĉo malkovris ion. Kion li malkovris? 3) Svenonte, kion la alveninta virino konstatis? 4) Kio aŭ kiu faligis la akvuĵon? Priskribu tiun parton de la sceno. 5) Imagu, ke vi estas la leono, priskribu ĉion kio okazis. 6) Kiuj ĉefaj malhelpaĵoj ĝenis Ĉoĉon dum lia restado en la kaĝo? Detale priskribu ilin. 7) Imagu, ke vi estas la filmisto kiu efektivigis kaj filmis tiun scenon. Detale rakontu ĉion, kion vi devis fari, por ke la sceno sukcesu. 8) Ĉu vi rekomendus al viaj geamikoj, ke ili spektu tiun filmon? Kial jes, aŭ kial ne? 9) Se tiu sceno filmiĝus hodiaŭ, en 2018, kiaj ŝanĝoj videblos en la filmo? 10) Vi laboras ĉe la radio. Imagu, ke mi estas Ĉoĉo. Faru kvinminutan radio-intervjuon al mi.

Komento pri uzo por altnivelaj parolantoj de Esperanto: Ĉiaj gramatikaĵoj kaj ĉiaj vortoj permeseblas ĉe la supera nivelo. Abundas subfrazoj kaj ankaŭ participoj kiel mallongigoj de tiuj subfrazoj. Ofte la demandoj eliras el la kadro de la filmo mem, kaj la respondoj al tiuj demandoj povas esti longaj, plurfrazaj, kaj eĉ debatecaj. Unu demando, unu komento povas rezultigi longan interdiskutadon inter la gelernantoj.

Traleĝinte la supran ekzemplon, vi nun havas pli konkretan ideon kiel leciono utiliganta senvoĉan filmon povas disvolviĝi kun diversnivela lernogrupoj. Sed antaŭ ĉio ne forgesu, ke la demandado okazas spontane. Vi NE legos liston da antaŭpreparitaj demandoj skribitaj sur papero. Vi kaj viaj

lernantoj vidos parteton de sceno de filmo, eble nur kelkajn sekundojn aŭ eĉ nur unu, kaj post tiu mallongdaŭra rigardado, vi haltigos la filmon kaj spontane starigos demandojn. Viaj lernantoj neniam scios kiuj demandoj ekaperos, kaj eĉ vi mem ne scios, ĉar vi reagis al al reagoj de viaj gelernantoj. Estas kiel disvolviĝas ĵazo, ne kiel ludiĝas skribita muziko.

La supra ekzemplo, kvankam ĝi montras ĝenerale, kio povas okazi dum leciono pri silentaj filmoj, tamen ne montras aŭtentikan, naturan dialogon. En venonta artikolo de IPR mi volas, por pli klarigi kiel povas okazi la disvolviĝo de unu leciono, priskribi detale, paŝon post paŝo, la interparoladon inter kursgvidanto kaj gelernantoj. Intertempe mi deziras al vi kaj al viaj kursanoj bonan lernadon de Esperanto per la tradiciaj metodoj, kaj mi invitas vin, por praktikigi viajn gelernantojn, utiligi iomete, (eble inter 5 kaj 15 minutoj ĉiulecione) la silentajn filmojn de Charlie Chaplin, kaj eventuale aliajn senvoĉajn filmojn de inter la jaroj 1895 kaj ĉirkaŭ 1930. Bonan praktikigadon!

Intervjuo kun la unua diplomito de RITE

IPR: Gratulojn, Patrick Morando pro la sukcesa fino de la Reta Instruista Trejnado ĉe Edukado.net. Ni scias, ke vi estas la unua, kiu finis tiun kurson. Kiel vi fartas? Kion tio signifas por vi?

PATRICK: Saluton kaj dankegon pro viaj gratuloj. Mi fartas tre bone kaj nun, fininte la kurson, eĉ pli bone! Mi estas vere kontenta, tiu kurso por mi estis granda defio. Kvankam mi studis fremdajn lingvojn (francan lingvon kaj ĝian literaturon) en la universitato en Ĝenovo, Italio, tamen vere mankis io, kio rilatis al metodiko, al tio kiamaniere oni instruas fremdan lingvon. Fine de la 90-aj jaroj, kiam mi vizitadis la universitatajn kursojn, la programo estis nur pri lingvo, literaturo kaj pri aliaj fakoj (historio, lingvistiko). Klerigado pri metodiko ne estis proponata, do la plimulto de la studentoj havis tiun „handikapon”, ili akiris grandan kulturalan kompetenton, sed nenion pri didaktiko. Nur post 2003 ekestis specialiĝoj pri tio.

IPR: La kurso konsistas el 7 studobjektoj: metodiko, gramatiko, movad-historio, literaturo, frazeologio, interlingvistiko kaj elektitaj prelegoj, entute 100 lecionoj. Kion tio signifas? Kiom ampleksaj estas tiuj lecionoj?



PATRICK: Jes, vi pravas. La kurso estas tre ampleksa: 100 lecionoj! Kiam mi komencis, mi dubis. Mi diris al mi mem: „Eble mi ne sukcesos!”, sed paŝon post paŝo mi sekvis la diversajn dosierojn kaj mi finis la tuton. Je la unua vido la kursaro aspektas nekredible senfina, sed ĝi estas tute farebla se oni studas nur kelkajn horojn ĉiusemajne. Oni devas pacienci, havi memdisciplinon kaj bone organizi sin mem. Tamen mi substrekas, ke ĝi estas tute farebla, la amplekseco nepre ne devas malkuraĝigi homojn. La kurso estas serioza, profesinivela. Oni ne devas forgesi, ke ni lernas por instrui nian ŝatatan lingvon.

IPR: Ni scias de Katalin Kováts, gvidanto de la trejnado, ke vi estas la unua finstudinto, kaj via fervoreco pelis ŝin fini ĉiujn lecionojn. Vidante la foton pri vi kun la dosieroj ni havas la impreson, ke vi vere laboregis. Kiom da tempo, kiom da laboro vi investis?

PATRICK: Kiam mi aliĝis fine de 2013, la tuta materialo ankoraŭ ne estis preta. Estis „eksperimenta fazo”. Mankis literaturo kaj dudeko da metodikaj dosieroj. La tutan kurson estras nur unu persono kaj kompreneble la ritmo haltis plurfoje pro diversaj, sed kompreneblaj kialoj. Nun la kurso estas

kompleta, do se iu diligente studas ĉiusemajne, li/ŝi povas fini post unu aŭ du jaroj.

IPR: Estis multe da hejmtaskoj, vi devis kompili tekstojn, analizi metodojn, krei ekzercojn. Kiom da dokumentoj vi kreis? Kaj kio estos ilia sorto?

PATRICK: Kiel en universitato aŭ en altnernajaj kursoj (por ne timigi la estontajn kursanojn ☺) estas teoriaj kaj praktikaj partoj. Iuj fakoj antaŭvidas nur la teorian parton, metodiko kaj gramatiko entenas ankaŭ praktikajn partojn, kie oni devas krei materialon: ekzercojn, prezentaĵojn, tabelojn aŭ serĉi inter revuoj kaj literaturaĵoj gravajn gramatikaĵojn. Mi listigis miaflanke 83 aktivaĵojn dum la tuta kurso. Iuj jam disponeblas en la sekcio „instrumaterialo”, aliaj aperos tie iom post iom. Dum RITE, ekzemple, mi lernis kiel fari „PowerPoint”-prezentaĵon, mi neniam antaŭe faris tion, kaj ekde tiam mi ilin pretigas por mia laboro. Mi plibonigis miajn komputilajn konojn, ĉar por sekvi la kurson, oni devas uzi programojn, krei filmetojn, sonmaterialojn ktp.



Patrick kun la materialoj de RITE

IPR: Kiuj estis viaj plej ŝatataj partoj, kaj kion vi ne ŝatis en la kurso?

PATRICK: Se diri sincere, miaj plej ŝatataj partoj estis gramatiko kaj interlingvistiko. Mi ŝatis pli-malpli ĉion. Interesa parto estis frazeologio, eble ne tiom esenca por tia kurso.

IPR: Ni scias, ke vi trapasis diversajn nivelojn kaj tipojn de la KER-ekzamenoj. Ĉu tio estis postulo de la RITE-kurso? Kiel vi ekzameniĝis pri la lernitaĵoj? Kaj kio pri la praktika ekzameno, nome la modelleciono?

PATRICK: Mi esperantistiĝis en 2011. Tiam mi lernis per reta kurso kaj poste mi iris al SES en Nitro. Tie mi aŭdis pri la KER-ekzamenoj kaj la sekvan jaron, ĉiam en Nitro, mi partoprenis la nivel-sesion B1. En 2013 mi trapasis en Liono la KER-B2 kaj meze de 2013 en Kastelaro dum la Itala Kongreso (la skriban parton) kaj komence de 2014 en Antverpeno (buŝan parton) mi akiris la nivelon C1. Mi pensis malsukcesi la parolan parton C1, mi vere timis la aŭdkomprenon, sed finfine mi sukcesis. Por sekvi RITE mi kredas, ke oni postulas almenaŭ la nivelon B2, mi legis tion en la koncerna paĝo.

Pri la RITE-lernitaĵoj post ĉiu leciono estas testo. Sukcesinte en ĝi oni povas antaŭenpaŝi, male oni devas ripeti la teston post unu tago. Koncerne la modellecionon mi devis skizi tri temojn kaj estis elektitaj du. Mi preparis du modellecionojn (argumenton, celon, tempon, programon, ekzercojn...) kaj de la du modellecionoj mi prezentis kaj filmigis unu. Mia temo estis rolludo (situaci-komunika metodo).

IPR: Ni imagas, ke vi restos en laborkontakto kun edukado.net kaj Katalin, sed krom tio, kiel vi povos en via Esperanto-agado uzi la lernitaĵojn?

PATRICK: Kompreneble mi esperas kunlabori kun ŝi kaj pretigi materialon por edukado.net kaj partopreni kiel onklo parolsesiojn ĉe EKPAROLU, sed tion mi faros post iom da paŭzo pro profesiaj kialoj. Intertempe ekde 2016 mi havis kursanojn en mia urbo kaj tiam mi komencis instrui. Du el miaj kursanoj aktoris en mia modelleciono. Tiun ĉi jaron mi sukcesis varbi kaj havi du diversajn kursojn (bazan kaj progresigan). Mi eĉ kreis fejsbukan paĝon „Genova Esperanto-klubo”. Des pli gravas mia agado, ĉar en mia urbo ne plu estas Esperanto-asocio. La plej proksima Esperanto-grupo estas 50 kilometrojn for.

IPR: Edukado.net kune kun ILEI nun lanĉis mallongigitajn retajn trejnadojn kaj la teoriar parton oni kompletigos per ĉeestaj seminarioj en Madrido kaj en Kotonuo. La kursanoj studos nur metodikon kaj gramatikon. Ĉu vi bedaŭrus ne havi ĉiujn studobjektojn de RITE? Kion vi konsilas al tiuj, kiuj aliĝis al la mallongigitaj RITE-kursoj?

PATRICK: Tio dependas de la kalendaro. Dum la RITE-studoj la tempo por studi estas pli fleksebla. En la du kursoj, kiujn vi menciis, eble pro diversaj kialoj, oni devis mallongigi la tuton. Laŭ mi RITE estas iomete tro ampleksa, sed ĝi donas vere kompletan rigardon pri la lingvo kaj pri ĝia kulturo. Ĉiuokaze, estus grave havi panoramon ankaŭ pri literaturo, movadhistorio kaj interlingvistiko.

IPR: Ĉu vi ŝatus ion aldoni, pri kio ni ne demandis vin?

PATRICK: Jes, mi nur deziras aldoni, ke estis bela sperto. Ne estas multaj lokoj, kie oni povas sekvi kursojn pri metodiko, interlingvistiko, gramatiko, frazeologio ktp.. Esperantistoj profitu je tio.

IPR: Dankon kaj denove korajn gratulojn al vi, Patrick!


Grava anonco diskonigenda

Okaze de la UK en Lisbono eblos por blinduloj trapasi lingvajn ekzamenojn. En 2011 ILEI lanĉis novan regularon pri ekzameno por blinduloj. Tia ekzameno ne ekzistas deflanke de la Komuna Eŭropa Lingva Referenckadro (pri lingvoregado) KER, do ILEI ekagis. La sesio estas kompreneble sufiĉe malsama kompare kun la kutimaj sesioj, kiuj enhavas multe da verkado kaj priskribon de bildo. Por tiu aparta publiko ne venos bildo sed objekto, kiun la kandidato ricevos en siaj manoj. „Ĉu vi povas priskribi tiun objekton? Ĉu vi povas diri, al kio tiu objekto utilas? Ĉu vi mem uzas tian objekton, uzus, ne uzus, ĉar...?” Jen la skemo de interparolado. Lega kompreno venos pere de teksto en brajla skribo. ILEI kreis tiun regularon en kunlaboro kun LIBE, la Ligo Internacia de Blindulaj Esperantistoj. La regularo legeblas ĉi tie: www.ilei.info/agado/ekzamenoj.php

Paroligiloj

de Mireille GROSJEAN, Svislando

De jaroj, jardekoj, mi kolektas dokumentojn por paroligi miajn gestudentojn okaze de lingvokurso kaj/aŭ de ekzameno. Povas esti fotoj, povas esti desegnaĵoj, povas esti karikaturaj. Ili devas enteni ion strangan, tiel ke, vidante la dokumenton, la studentoj tuj volos priskribi la strangaĵon aŭ demandi pri ĝi. Jen mi elektis du por vi. En mia kolekto estas proksimume 300.



Borde de la maro sidas sur ŝtono „marvirineto”. Tio estas estaĵo duone virino duone fiŝo. Mi supozas, ke ĉiu persono en la mondo aŭ konas tian fabelan estaĵon aŭ povas imagi, ke ŝi loĝas en maro. Sur la bildo ŝi sidas en la sama pozo, kiel la fama statuo en Kopenhago, Danlando. Eĉ ne sciante tion, la studento povas priskribi tion, kion li/ŝi vidas.


Sur la karikaturon la marvirineto priskribas katastrofan evoluon, kiu minacas ŝin: ŝia vivmedio, la oceano, fariĝas ĉiam pli malpura. En la parolveziko aperas skeleta marvirineto, tion ŝi priskribas. Bedaŭrinde mankas al mi indiko pri la fonto de tiu desegnaĵo.

Du manoj senŝeligas la Teron. Rigardu bone la rezulton: la Tero aspektas kiel luno poste. Do katastrofo! Neniu vivo plu! Vi povas konstati, ke iel iom la du desegnaĵoj traktas la saman temon. La fonto estas la svisa germanlingva satira revuo „Nebelspalter”.



Okaze de ekzamenoj de ILEI/UEA pri lingvokapablo la kandidato ricevas bildon, kiu povas esti karikaturo. La kandidato devas paroli pri tio, kion li/ŝi vidas. Ofte mi sugestas, ke la kandidato iru laŭ etapoj: unue diru tion, kion vi vidas. Due diru, kio okazas, kion la desegnisto volas esprimi per tiu desegnaĵo. Trie diru vian opinion pri la bildo kaj la enhavo laŭ la desegnisto. Ĉu vi samopinias kiel la desegnisto? Tiam laboron oni bone povas fari okaze de kurso aŭ de diskutrondo. Povas sekvi debato pri la prezentita temo. Tre interesa povas esti jena labor-organizado: unu partoprenanto ricevas la dokumenton sen rajti montri ĝin al aliaj. Tenante ĝin kaŝita, li/ŝi devas priskribi ĝian enhavon al la grupo. La personoj en la grupo, en la klaso, provas imagi ion laŭ la diroj de la bildohavanto. Tiam la priskribo devas esti detala, preciza kaj kompleta. Malfacila tasko! Fine la grupo rajtas vidi la bildon, tio estos ia rekompenco. Aŭdiĝas ridoj aŭ „ahhhhhhh!! mi nun komprenas!”

Kompreneble tiaj verkoj povas rilati al iu regiono, kulturo, al la biblio aŭ al alia religia sankta libro, al la spektakla mondo okcidenta... Ili povas havi politikan enhavon. En Esperanto-kursoj kun internacia publiko kaj en Esperanto-ekzamenoj oni devas atenti, ke la elektitaj bildaj dokumentoj estu komprenataj de ĉiuj partoprenantoj. Tio estas defio por la instruisto kaj testoverkanto. Laŭ mia supozo, ĉiuj legantoj de IPR povas kompreni la tutmondan problemon de mediprotektado vidante tiujn du karikaturojn. En 2011 en Burundo, okaze de ekzameno, mi uzis pentraĵon de Hans Erni, svisa artisto, kiu alvokas al protektado de arbaro. „Savu la arbaron!” legiĝas sur la foto, kie vidiĝas, ke iu tranĉis la gorĝon de la arbo, kiu aspektas homo. La kandidato tuj komencis paroli pri la milito kaj la memoraĵoj, kiuj abundis en lia menso; la milito finiĝis en 2005, do tute freŝdata evento. Tiam li vidis tiajn vundojn ĉe homoj. Ŝoko por li, ŝoko por mi. Tuj mi prezentis al li alian bildon. Ankoraŭ nun mi estas trista, ke mi faris al li tian ŝokon.



DEK JAROJ EN ESPERANTO-LANDO - parto 5

En 2015 Luiza verkis eseon, rando de kiu Mirejo komentas kaj faras demandojn, kiujn Luiza respondas.

(La unuaj 4 partoj aperis en antaŭaj numeroj)

KION MI TROVIS ESPLORANTE LA ORIGINALAN LITERATURON DE ESPERANTO

Ĉefe mi serĉis kaj trovis la trian metodon „mal fremdigi” por mi librojn, kiujn oni ne verkis en mia denaska lingvo. La unua metodo estas legado de tradukaĵoj (ĉu rektaj, ĉu efektivigitaj pere de „pontolingvo”). La dua metodo estas legado de la originala teksto. (Tio postulas unue lerni la denaskan lingvon de la aŭtoro. Nur en 3 etnaj nendenaskaj lingvoj mi kapablas nun havi tian sperton, do mi konsideras tiun eblecon ege limigita.) La tria maniero estas legi originalan tekston en Esperanto. Tio postulas lernadon de Esperanto kaj de la flanko de la aŭtoro, kaj de la flanko de la legantoj. Ĉar Esperanto estas aparta lingvo, kapabla eniri facile kaj rapide la subkonscion, la ŝanco, ke la lingva barilo inter la aŭtoro kaj la leganto fandiĝu, estas tre granda.

MIREJO: Kara Luiza! Vi skribas, ke Esperanto estas aparte kapabla eniri facile kaj rapide la subkonscion. Tio mirigas min. Ĉu vere? Kaj pro kio tio okazas?? Mi tre dezirus, ke vi detaligu tiun punkton, se eblas.

LUIZA: Via demando estas por mi tute neatendita. Verdire, ĝis nun mi sentis tiom profunde tion, ke mi neniam cerbumis kial. Mi supozis, ke ĉiuj e-istoj sentas samkiel mi, sed jen evidentiĝas, ke tio ne okazas. Nu, ĉar vi demandis, mi cerbumis pri la kialo kaj nun mi povas respondi miasupoze, kvankam mankas al mi bibliografio pri sciencaj psikologiaj esploroj koncerne tiun fenomenon.

Mi ĉiam supozis, ke ju pli ofte ni praktikas iun agadon, des pli rapide kaj profunde ĝi eniras nian subkonscion. Do, estus tute normale, ke regulaj gramatikaj formoj eniru la subkonscion pli rapide ol la esceptoj, ĉar la regulojn ni uzas pli ofte. Almenaŭ mi mem faras certe pli multajn erarojn rilate esceptojn ol rilate regulojn, kiam mi parolas etnajn lingvojn, kiujn mi ne scipovas denaske. Ofte okazas, ke iu gramatika regulo jam delonge eniris mian subkonscion, do mi uzas ĝin eĉ kiam oni vekas min subite el profunda dormo, dum pri la esceptoj mia menso devas aparte fokusiĝi kaj, kiam mi

estas malatenta aŭ laca aŭ emociita, ... mi forgesas, ke la regulo fakte ne funkcias en tiu aparta kazo. Esperanto ne havas malregulajn gramatikajn formojn, do tial mi supozis, ke la lingvo eniras pli rapide la subkonscion... Sed eble mi malpravis, kiam mi ĝeneraligis la fenomenon... Ĉu?

=====

Sed kiam temas pri „malfremdigo” de literaturaj universoj, indas kalkuli ankaŭ la psikologian faktoron. La aŭtoroj de originala Esperanta literaturo samkiel la legantoj de tiu literaturo apartenas al la Esperante parolanta komunumo kaj kundividigas pli-malpli ĝiajn ĝeneralajn ecojn. Tio signifas, ke ili estas kutime tre malfermitaj al inter-kulturaj dialogoj kaj kontaktoj. Alivorte, kaj la aŭtoroj kaj la legantoj kundividigas grandan deziron fandi la lingvajn barilojn. Verŝajne ankaŭ tio estas unu el la kialoj, pro kiuj mi konsideras tiun ĉi „trian metodon” la plej ĝuinda kaj por la legantoj kaj por la aŭtoroj.

Plurlingveco estas pli kaj pli ofta fenomeno niatepe, koncerne kaj legantojn kaj verkistojn. La Esperantaj verkistoj oftege verkas ankaŭ etnalingve. Kelkfoje oni demandas min, ĉu oni povas paroli pri originala Esperanta beletraĵo eĉ se la aŭtoro verkis en alia lingvo la unuan version de la koncerna verko. Al tiu demando mi respondas parolante nur pri mi mem, ĉar eble aliaj verkistoj pensas kaj sentas alimaniere. Mi neniam „tradukis” miajn proprajn verkojn, sed mi kreis kelkfoje originalajn versiojn de la sama verko en du aŭ tri lingvoj. Kiam mi ellingvigas la tekstojn de aliuloj, mi klopodas fideli kiel eble al la originalo kaj nomas tiun agadon „tradukado”. Sed kial mi klopodu ne ŝanĝi mian propran malnovan tekston okaze de ĝia transloĝigo en alian lingvon? Kial mi ne plibonigu ĝin se eblas? Eĉ se mi faras preskaŭ neniun ŝanĝon al mia dekomenca teksto, la simpla fakto, ke mi sentas min tute libera decidi kion fari pri mia propra verko, igas min konsideri la rezulton originalo kaj ne tradukaĵo. Tiamaniere, mi havas kelkfoje po 2 aŭ 3 originalajn versiojn de la sama verko en malsamaj lingvoj.

=====

MIREJO: Kara Luiza! Tiu parto aparte plaĉas al mi. Same mi foje verkis pri la sama temo en diversaj lingvoj. La ideoj devas ekloĝi en la strukturo de la cellingvo kaj uzi tion, kion tiu lingvo proponas al verkisto. La lingvo estas iom kiel muldilo. Okazas, ke la ideoj trovas taŭgan formon, aŭ la verkisto devas iom modifi la esprimon, por ke ĝi trovi lokon en nova „lito”. En Esperanto la esprimlaboro estas iom aparta pro la fakto, ke oni povas krei la bezonatan vorton. Giganta libereco por la verkisto!

Sed mi deziras reveni al la komenco de ĉi tiu paragrafo, kiam vi skribas: „Plurlingveco estas pli kaj pli ofta fenomeno niatepe”. Vi tute pravas. En

la kvindekaj, sesdekaj jaroj oni konsideris, ke plurlingveco ĝenas la infanon, ke la infano neniam regos la lingvojn bone, ke povas esti ia traŭmato por la etulo. Tamen la pensmaniero evoluis. Okaze de kongreso por lingvo-instruistoj mi povis demandi Profesoron Bernard Py, faman svisan lingviston, kiel tiu evoluo povis okazi. Mi resumas lian respondon: En Svislando oni sekvis la lernejan trairadon de dulingvaj infanoj, kaj oni observis, ke ili ne same multe ripetas lernejojaron, kiel la unulingvaj infanoj. Do dulingveco faras, ke la infano estas pli inteligenta. Ni publikigis la rezultojn de tiu scienca esploro, kaj tio kontribuis al la evoluo de la pensmaniero pri dulingveco aŭ plurlingveco.

LUIZA: Jen interesa informo, kiun mi ne forgesos uzi, kiam oni demandos min pri tiu aspekto de edukado. En 2016, mi prezentis eseon pri Esperanto okaze de simpozio de la Rumana Akademio en Kluĵ, kie mi asertis, ke la idealo de la Esperanta Movado estus, ke ĉiuj infanoj en la mondo eklernu po almenaŭ du lingvojn: la denaskan kaj Esperanton. Tiuokaze oni petis de mi bibliografion pri la oportuneco de infana dulingveco. Tiam mi interesiĝis, kaj Renato rekomendis al mi la jenan disertacion:

„Cognitive and Linguistic Processing in the Bilingual Mind” by Ellen Bialystok, York University and Fergus I.M. Craik Rotman Research Institute of Baycrest, Toronto, Canada, 2010: http://www.psychologicalscience.org/journals/cd/19_1_inpress/Bialystok_final.pdf?lan=ayajzqechdlh

Temas pri tre serioza scienca esploro, kiu konkludas, ke dulingveco helpas al la ĝenerala mensa evoluo de la infanoj, kvankam la unulingvaj infanoj kutime havas pli vastan vortotrezoron en sia sola denaska lingvo ol la dulingvuloj. Sed tiu malavantaĝo de dulingveco forviŝiĝas kutime post kelkaj jaroj, dum la granda avantaĝo de frua mensa stimulado ŝajnas pli grava.

Dum tiuj dek jaroj, mi trovis en la Esperanta literaturo kelkajn el miaj plej amataj legaĵoj, kiuj riĉigis mian animon kaj multe kontribuis al mia persona evoluo. Eĉ en miaj plej optimismaj revoj pri la Esperanta kulturo, mi ne povis imagi en 2005, ke mi trovos tiom da trezoroj en tiu malvaste konata lingvo. Mia poioma surpriziĝo pruvas, ke oni kutime ne parolas sufiĉe pri la amplekso kaj la kvalito de la Esperanta literaturo, kiam oni informas pri Esperanto. Eble oni timas, ke la komencantoj seniluziiĝos, se ili ne tuj trovos tion, kion ili atendas. Ĉu? Sed oni povas eviti seniluziiĝon tiudirekte per frua kaj taŭga orientado de la lernantoj, por ke ili kapablu elekti siajn legaĵojn kiel eble plej frue kaj plej konscie. Se temas pri orientigo sur la mapo de Esperanta kulturo, mi ne povas rekomendi pli bonan gvidlibron ol *Vojaĝo en Esperanto-lando* de Boris KOLKER.

Kvankam en 2005 mi estis tre scivola malkovri la Esperantan originalan literaturon, tiam mi iel kundividis la kutimajn antaŭjuĝojn de multaj ne-esperantistoj: senkonscie aŭ eble iom konscie, mi supozis, ke tiom juna literaturo ŝajnos al mi iel naiva, malriĉa kaj ne-evoluinta. Mi iel atendis trovi nur beban literaturon... En mian menson venis rememoroj pri naivaj eksmodaj verkoj kreitaj en diversaj etnaj lingvoj, dum tiuj lingvoj estis malpli-ol-150-jaraĝaj... Mire mi malkovris, ke iusence Esperanta literaturo naskiĝis kiel pli-malpli „matura bebo”...

En neniu alia lingva komunumo mi trovis tiom grandan procenton de poeziemuloj. Eble tio okazas, ĉar la lingvo mem estas arteca, belsona, facile rimebla. Krome, la fakto, ke en Esperanto oni ne devas akiri „vortotrezoron” sed „radikotrezoron”, stimulas la parolanton krei belajn taŭgajn vortojn. Tiel Esperanto donas al la parolanto kaj liberecon elekti inter amaso da sinonimoj (kio estas la avantaĝo de lingvoj kun riĉa vortotrezoro) kaj grandan precizon de esprimado (kio estas la avantaĝo de lingvoj kun malriĉa vortotrezoro).

Esperanto per rekta metodo de Stano Marĉek


recenzo de Anna LOWENSTEIN, Britujo

Tuj kiam mi unue vidis la lernolibron de Stano Marĉek, *Esperanto per rekta metodo*, mi komprenis, ke tio estus perfekta akompanaĵo al la Cseh-kurso. La libro ebligas al tiuj instruistoj, kiuj instruas laŭ la klasika Cseh-metodo, kompletigi ĉiun lecionon per ekzercoj kaj legotekstoj. Ili devus nur eventuale revizii la vicordon de siaj propraj lecionoj, por ke ili akordiĝu kun la sinsekvo en la libro. Poste la lernantoj havus libron por porti hejmen, tiel ke ili povus relegi jam studitan lecionon aŭ rekapti maltrafitan materialon. (Fakte, mi neniam sukcesas kompreni, kial manko de lernolibro, baza principo de la Cseh-metodo, estas vidata kiel avantaĝo.)

La instruataj konceptoj estas prezentataj koncize kaj simple, kaj fakte tiu malgranda libro tre rapide kovras multe da materialo, inkluzive de la tuta baza gramatiko, ĉiuj oficialaj sufiksoj kaj prefiksoj, kaj sufiĉe ampleksa baza vortprovizo. Stranga manko, tamen, estas klarigo pri la maniero formi la

landonomojn, eventuale pro deziro eviti tiun disputvekan temon.

-ino



knabo kaj knabino

La vortprovizo estas klasika, kaj konsistas nur el Fundamentaj kaj oficialigitaj formoj, tiel ke eĉ konata Bonlingvisto kiel mi mem senĝene povas uzi ĉi tiun libron. Mi bedaŭras nur pri enmeto de la vorto „animalo”, kio eventuale kontribuos al kreskanta nuntempa emo uzi tiun vorton en kuntekstoj, en kiuj sufiĉus la Fundamenta vorto „besto”.

Intertempe mi kreis ankaŭ mian propran instrumaterialon por akompani la libron, kaj post ĉiu leciono mi tralegas kune kun la lernantoj la koncernan ĉapitron el la libro. Se vi interesiĝas pri tiu instrumaterialo, verkita por akompani la lernolibron de Marček, la individuaj lecionoj estas troveblaj en edukado.net kun la titolo *Esperanto Rektmetode*.

Rimarko de la redakcio: la lernolibro jam aperis en 40 lingvoj [vd. la dorsokovrilon de la nuna numero]: la angla, franca, itala, rusa, ĉina, japana, korea, portugala, pola, slovaka, taja, Esperanta, greka, nederlanda, irlanda, rumana, germana, dana, litova, serba, vjetnama, norvega, luksemburga, hungara, serba, finna, ĉeĥa, hispana, ukraina, sveda, tajvana, armena, islanda, indonezia, turka, hinda, bulgara, latina, araba kaj latva. Akompanas ĝin komuna didaktika materialo: instruaj bildoj por rektmetoda instruado (por la instruistoj, 500 kartonaj folioj A5 en du kofretoj, kiuj paŝo-post-paŝo sekvas la lernolibron – ankaŭ sur KD por projekcii la bildojn); KD Modela elparolo en mp3 (voĉlegitaj Esperantaj tektoj + la lernolibro en diversaj lingvoj en pdf, por komputila uzo) kaj Pekseso Esperanto (kartludo, 12 volumoj kun 288 bildoj el la lernolibro).

El la landoj kaj sekcioj...

Ĉinio

Kvarjara Esperanto-fako de Zaozhuang-a Universitato estas promesita de la Ĉina Ministerio de Edukado la 21-an de marto 2018. Tio signifas, ke post Ĉina Komunika Universitato, kiu kelkajn fojojn havis la fakon EO, troviĝos dua universitato kun oficiala edukado de EO. Laŭ la plano, la studentoj de Esperanto post kvarjara studo povos akiri diplomon de bakalaŭro pri literaturo. Por kontentigi la profesion kaj laboron, ni instruos Esperanton kaj la anglan en du direktoj: nome komunikado kaj interreta komercado. Bonvolu sendi vian opinion al ni, por ke ni povu pli bone efektiviĝi la planon.

Semio (孙明孝, semio@163.com)

Francio

Esperanto-programo de kastelo Greziljono en 2018

2018-jul-09/27: Maratona Esperanto-kurso dum 18 tagoj kun Perla Mielo, Louis Jeuland, Nina Danylyuk, Mikaelo Bronŝtejn

2018-jul-09/16: Interŝanĝoj de scioj kaj faroj kaj Esperanto-kurso

2018-jul-15/21: Semajno de ĉiĉeronado en la regiono Anĵuo kun C. Kremer

2018-jul-16/21: Speciala semajno kun kursoj de EO kaj de la franca lingvo

2018-jul-21/27: Internacia E-Konferenco de OSIEK „Esperanto en Artoj”

2018-aŭg-11/19: Festa Semajno por infanoj kaj familioj

2018-okt-26/nov-03: AŬTUNE la Esperanto-ferioj - kun halovena festo kun Dennis Keefe

Kontakto: kastelo@gresillon.org

Grava por nia movado en Francio estis la jaro 2017

Post sesjara klopodo kaj sekve al unua renkontiĝo kun la Kabineto-Direktoro de la ministro Najad Vallaud-Belkacem (14/Sept/2016), nia eta komisiono *Espéranto-au-Bac* rendezuis la 14-an de februaro 2017 kun 6 reprezentantoj de la Direction Générale de l'Enseignement SCOLAIRE (DGESCO) (Ĝenerala Gvidado de la Lerneja Instruado).

Finfine, la 12-an de aprilo, per letero de la DGESCO la Ministerio pri Edukado sciigis nin, ke instruado de Esperanto povos esti eksperimentata, kie troviĝos konsento de la estraro kaj volontuloj por ĝin lerni kaj instrui.

Esperanto-France francskale, ILEI kaj UEA mondscale diskonigis tiun gravan atingon kaj alvokis ĉiujn instruistojn provi enkonduki Esperanton en sian lernejon. En Francio, kvardeko da instruistoj sin proponis por partopreni kaj fine de decembro 2017, oni elnombras 11 sukcesintojn en: 1 baza lernejo, 4 mezlernejoj, 6 superaj mezlernejoj. Eksterlande 6 lernejoj, 12 mezlernejoj, 5 superaj mezlernejoj registris sin en la tiucela listo de www.edukado.net. Krome, ankaŭ en 17 universitatoj eblas lerni Esperanton (2 en Francio).

Intertempe, denove okazis „blanka abiturientekzameno” (ekzerca malvalida ekzameno) en la supera mezlernejo de Chaumont: 6 lernantoj ĝin trapasis. Samloke, junio, 5 el ili partoprenis la oficialan KER-ekzamenon, nivelo B1: kvar sukcesis.

La DGESCO ne postulis apartan atingendan celon de ni, krom arigi sufiĉan nombron da Esperanto-instruistoj kaj lernantoj. Tamen, ni opinias, ke post 3 jaroj (en 2020) estus esperinde elnombri instruadon de nia komuna lingvo en kvardeko da lernejoj. Tiu celo ŝajnas atingebla se konsideri la nombron de niaj nunaj kaj certe estontaj instruistoj!

Raportas Aleks ANDRÉ kaj Guy CAMY

Germanio

Rememore al Franz-Georg Rössler



Redaktante la nunan numeron mi rememoris, ke antaŭ unu jaro forpasis mia amiko, nia iama redakciano, Franz-Georg Rössler. Franz estis vigla, entreprenema, sprita, pensema kaj ofte ŝercema homo. Li tute ne ŝatus legi malgajajn rememorojn. Li havis siajn proprajn principojn kaj kelkfoje estis malkontenta, se li vidis maljustaĵon aŭ homan malsagaĵon, sed eĉ tiam li ne perdis sian bonhumoron. Ekzemple li gaje informis min, ke la gimnazianoj elektis lin „la plej malmode vestita instruisto”. Fakte laŭ sia propra vivkoncepto li ne elspezis multe da mono por laŭmodaj vestaĵoj, sed li vestis sin per uzitaj, tamen bonkvalitaj vestaĵoj ricevitaj de la paren caro. Kaj

tion li „instruis” ankaŭ al mi, ja ĉiun fojon li kunportis uzitajn vestaĵojn al mi kaj mia familio. Ĉar li ne ŝatis la hundojn, foje okazis, ke li envenis en mian domon ne tra la ĉefa enirejo norde, kiun gardis mia petolema hundo, sed tra la fenestro en la suda flanko. (Pri sia rilato kun la hungaraj hundoj, pri ilia dumnokta bojado kaj la malpuraj stratoj li verkis spritan eseon, kiu aperis en la trilingva *Hungaraj skizoj*, al kiu libro ankaŭ mi kontribuis).

En sia kapo li ĉiam laboris, tie kreskis novaj ideoj, novaj temoj. Neniam li sidis faranta nenion. Li ankoraŭ volis fari multon, skribi, komponi, dokumenti, eldoni ktp. Bedaŭrinde li tro frue forpasis!

Dum pli ol 35 jaroj (inter 1976 kaj 2012) li laboris kiel gimnazia instruisto pri la fakoj muziko kaj geografio en la fama katedralurbo Speyer, Germanio. Li komponis ĉ. 200 muzikaĵojn, verkis 100 librojn kaj broŝurojn germane, Esperante kaj hungare. Kun siaj bildoj kaj aliaj artaĵoj ekde la jaro 1994 li havis ĉ. 120 ekspoziciojn. Ĉion ĉi plej ofte li faris kune kun sia edzino Rita Rössler-Buckel. Ankaŭ en mia urbo, parte kun mia helpo, li havis plurajn ekspoziciojn en la urba biblioteko, kulturcentro kaj la kalvinana gimnazio. En la ekspozicioj estis videblaj ankaŭ la pentraĵoj de Rita, kaj dum la malfermoj kutime ili muzikis, prezentante klasikaĵojn aŭ la komponaĵojn de Franz. Pri Esperanto li okupiĝis dum 32 jaroj. Li estis membro de ĉ. 20

Esperanto-asocioj kaj redakcioj, instruis Esperanton, partoprenis 14 UK-ojn, kaj ĉ. 50 regionajn, landajn kaj fakajn kongresojn / konferencojn. Li verkis ĉ. 570 tekstojn en Esperanto, eldonis 40 librojn kaj broŝurojn en kaj pri Esperanto. Li havis ĉ. 100 prelegojn: la duono de ili estis muziktemaj, sed li prelegis ankaŭ pri bildoarto, lingvo kaj literaturo. Liaj artikoloj aperis ĉefe en *Monato*, *La Gazeto* kaj *Scienca Revuo*. La verkoj de Franz troviĝas en multaj germanaj bibliotekoj, kaj lia propra biblioteko konsistas el 700 volumoj.

Lia tombo troviĝas en lia lasta loĝloko Dudenhofen, apud Speyer. En tiu tombejo estas tri diversaj partoj. La plej granda parto konsistas el tradiciaj tomboj, sufiĉe grandaj kun starantaj tomboŝtonoj kaj sufiĉe da loko por floroj, arbustetoj kaj kandelingoj. La dua estas la parto de nura urna enterigo, tamen ili havas lokojn 80x80-cm-ajn kadritajn kaj oni metas tien malgrandajn tomboŝtonojn, kandelingojn kaj florojn. La tria parto, kie troviĝas Franz, estas nur gazona parto. Tie eblas urna kaj ĉerka enterigo, sed poste sur la gazonon oni nur metas la ŝtonplatojn. La ŝtonplatoj 50x50-centimetraj, metitaj sur la teron, montras engravuritaj la nomon kaj datojn de la mortinto. La komunumo regule tondas la gazonon. Flegado fare de la familianoj ne necesas. Bonvena elektoeblo nuntempe por multaj pro manko de familiano aŭ parenco, kiu povus aŭ volus flegi la tombon. Demeto de floroj, kandeloj aŭ tombo-ornamaĵoj estas malpermesitaj, escepte de vintra tempo.

La supre engravurita teksto sur la ŝtonoplato de Franz estas malnova popolkanto el ĉirkaŭ 1450. Ĉi tiu frazo kvazaŭ kiel ruĝa fadeno tiriĝis tra la vivo de Franz kaj koncernas lian interrilaton kun la edzino. Li plurfoje verkis muzikon al tiu teksto. Interalie dum grava operacio de Rita en 2004 li sidis en la malsanuleja kapelo kaj muzikigis tiun tekston. „*All mein Gedanken, die ich hab, die sind bei dir*”. Vorte tradukita: „Ĉiuj miaj pensoj, kiujn mi havas, estas ĉe vi”. En Esperanto tio sonas ne tiom arte, tamen Esperanto ja ne povas manki sur lia tomboplato: DORMU EN PACO.



Jozefo NÉMETH

Semajnoj de Esperanto-Perfektigo -SEP3 - 2018

La trian fojon Interkultura Centro Herzberg organizas dusemajnan someran intensan lingvo-perfektigan kursaron en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo. SEP = Semajnoj de Esperanto-Perfektigo: 2x1 semajnoj (01-08 kaj 08-15.07.2018).

- 1) Esperanto-lingvokursoj por a) Komencantoj, b) Progresintoj
 - 2) Instrukapabliga-metodika trejnado por EO-instruantoj (klerigmodulo)
- Ĉiutage: 6 instruhoroj. Posttagmeze: urborigardado, ekskursoj kun gvidado, promenado, sportoj. Vespere: Filmoj, muziko, ludoj, babilado.
- 1 semajno 120,00 €; 14 tagoj 185,00 €. Favorkotiza loĝado (eĉ tendumado) kaj komuna manĝado estas aranĝeblaj. Eblas ricevi stipendion, bv. demandi! (Rabatitaj prezoj: ekz. por studentoj)

Detaloj ĉe <http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=49486323>
Kontakto: esperanto-zentrum@web.de

Israelo

Granda sukceso por la E-kurso en Tel-Avivo

Multaj opinias, ke jam pasis la epoko de klasaj kursoj, ke nuntempe oni lernas E-on ĉefe rete, per kursoj kiel Duolingo kaj Lernu! aŭ aŭtodidakte. Efektive ankaŭ E-Ligo en Israelo (ELI) tiel opiniis, pro la daŭra malpliigo de lernantoj en ĝiaj E-kursoj en la lastaj jaroj. Lastatempe, post plurjara paŭzo, ELI decidis, eventuale lastfoje, reprovi klasan kurson. Estis decidita senprecedenca buĝeto por reklami la kurson. La reklamkampanjo rikoltis multege pli da lernantoj ol prognozis eĉ la plej optimismaj taksoj.



ELI Esperanto-Ligo en Israelo
Publikigita de Amri Wandel · 4 · marto 4 · €

קורס בן 15 שיעורים ללימוד השפה הבינלאומית הקלה בעולם יפתח ביום שישי 12.3 במרכז תל-אביב, בשעה 19:30-21:00. לפרטים והרשמה: 052-3605716. <http://verkoj.com/kurso>

קורס לשפת אספרנטו בתל אביב 12.3.2018

ELI Esperanto-Ligo en Israelo
Senprofita organizaĵo

Sendi mesaĝon

5 511 people reached

Boost Again

La reklamado okazis en tri kanaloj: strat-afiŝoj, Facebook, kaj la gazet-anonco. Oni pendigis ĉ. mil grandajn afiŝojn sur publikaj tabuloj en Tel-Avivo kaj apudaj urboj. En Facebook mi afiŝis pagitan reklamon por specifa celgrupo: loĝantoj en aŭ najbare de Tel-Avivo, interesiĝintaj pri temoj kiel planlingvoj, internacia komunikado kaj, kompreneble, Esperanto. Laŭ la raporto liverita de Facebook, ene de unu semajno tiu afiŝo estis vidita de ĉ. 5500 personoj (*vidu foton*), sed nur ĉ. 1% aktive reagis (ekzemple per

„ŝato”). Por la gazetara kanalo estis elektita „Haarec”, la tria plej legata gazeto en Israelo, kiu tamen estas la plej populara inter kulturemaj kleraj personoj. ELI mendis duonpaĝan anoncon en ĝia semajnfina kultura magazino „Galeria”, kiu kostis ĉ. 1000 eŭrojn, sed montriĝis kiel bonega investo.

Ni sondis inter la kursanoj, per kiu reklam-kanalo ili eksciis pri la kurso, kaj evidentiĝis, ke preskaŭ ĉiuj alvenis pro la anonco en „Haaretz”. Kvankam multekosta, tiu anonco alportis pli ol dudek kursanojn, kies kotizoj estas pli ol duoble la kosto de la anonco. Kelkaj pliaj venis pro personaj kontaktoj aŭ informoj de antaŭaj jaroj. Malpli ol 10% venis pro la stratafiŝoj (kiuj kostis pli ol la anonco) kaj 10% pro la reklamo en Facebook (kiu kostis nur 120 eŭrojn). Tiuj informoj estas ege valoraj por plani estontajn reklam-kampanjojn.



Ĉiuj reklamoj invitis informiĝi pri la kurso telefone aŭ rete. La informpetintojn zorge traktis nia s-ano Amir Naor, kiu pacience respondis, invitis, kaj konvinkis. Entute registriĝis ĉ. 40 personoj en ĉiuj aĝoj - la plej junaj estas lernejoj, la plej aĝaj - delonge pensiuloj.

Por la kurso-inaŭguro alvenis 36 personoj, kaj pliaj promesis veni en la posta semajno. La ĉambro estis plenplena. La sperta instruisto, d-ro Doron Modan, estis surprizita kaj ekscitita pro tiu neatendite granda nombro. Malgraŭ la manko de spaco, la unua leciono okazis en bona kaj trankvila etoso, la lernantoj progresis rapide kaj interesiĝis pri la sekvo.

En la dua leciono, la nombro de lernantoj stabiligis je 30. La ceteraj decidis atendi ĝis la venonta kurso. Tiu nombro estas pli malpli la maksimuma kapacito de nia kluba saloneto. Efektive, pro la manko de spaco ne ĉiuj povis sidi ĉe tabloj, la lernantoj sen tabloj ricevis personajn skribtabletojn (*vidu foton*). Entute okazos 15 lecionoj ĝis julio.

En la dua leciono mi salutis la lernantojn nome de ELI, informante ke Esperanto estas pli ol lingvo: socia fenomeno, movado, ideo, kaj praktika maniero por vojaĝi tutmonde kaj renkonti aliajn personojn sen lingvaj baroj, kiel apenaŭ eblas per etnolingvoj. Mi invitis ilin sperti tiun etoson vizitante la klubkunvenojn, kiuj okazas samloke, tuj antaŭ la lecionoj. Sekve mi sugestis, ke ili povu gustumi internacian etoson en la Israela Kongreso, kaj eĉ pli sperti la E-socion kaj kulturon en la Universala Kongreso. Mi rakontis, ke jam 45 jarojn mi partoprenas la UK-on preskaŭ ĉiujare, kaj sekve kelkaj el la lernantoj jam interesiĝis pri Lisbono...

Nu, eble ne estas la Fina Venko, sed ŝajne mejloŝtono por E-o en Israelo, kaj eble ankaŭ alilande. Montriĝis, ke per taŭga reklamado kaj personaj kontakto kaj instruado eblas okazigi allogan klasan kurson ankaŭ en la interreta epoko. Longjara sperto montras, ke post la kurso restas en kontakto kun Esperantujo malpli ol 10% de la lernantoj. Laŭ la entuziasmo en la nuna kurso, ŝajnas ke ĉi-foje la procentaĵo estos pli alta. Eble eĉ multe pli. Espereble montriĝos, ke tiuspeca persona reklamado kaj instruado povas havi bonajn rezultojn, kaj el la vidpunkto de movada daŭripovo, eble eĉ pli bonajn ol instruado per la interretaj amaskursoj. Tio dependas de la homa faktoro, ne nur de la instruisto, sed de la membroj. Se ni scipovos teni la varman bonvenigan etoson, la lernantoj eble vidos, ke E-o estas pli ol lingvo, kaj pluraj el ili gustumos kaj restos en Esperantujo. (Fonto: la revuo *Esperanto*)

PS. Post kelkaj lecionoj montriĝis, ke la kursanoj efektive integriĝas en la kluba vivo. 5-10 el ili regule venas pli frue por ĉeesti la klubkunvenojn. Ankaŭ inverse, pluraj s-anoj restas por ĉeesti la lecionojn kaj helpi al la instruisto.

Amri WANDEL

DR Kongo

Konciza agadraporto de la klubo *Verda Flago* de Mbanza Ngungu

Verda Flago klubo iom post iom denove vigliĝas kun la volo kaj la dinamiko de siaj novaj kaj malnovaj membroj kaj simpatiantoj. La klubo provizore estas gvidata de s-ro Matondo MASHA helpata de s-ro Roger MBUNGA, kiu okupiĝas pri administrado kaj instruado, s-ro Arlain KIZEYIDIOKO pri la instruado kaj sekretaria laboro.

La klubo Verda Flago propagandas kaj informas pri Esperanto per sia agado, por la utiligo de la lingvo; la renkontiĝoj okazas laŭbezone ĉe s-ro Arlain KIZEYIDIOKO (specialaj kunvenoj) ĉe la avenuo Kola 18, kie troviĝas la provizora sidejo, en la kvartalo Loma en la urbo Mbanza Ngungu je 150 km sudokcidente de Kinŝasa, en la provinco Centra Kongo, DR Kongo. Precipe semajnofine, sabate kaj dimanĉe, je la 15a ĝis la 18a horoj. Dum tiuj kunsidoj temas pri la kluba vivo kaj la parolaj ekzercoj, dum kiuj oni diskutas pri la movadaj aferoj, la kulturaj aferoj kaj pri la gramatiko de la lingvo Esperanto. Okazas foje, ke iu elektita membro de Verda Flago prelegetas pri jam legita libro aŭ pri ia kultura temo. Por partoprenigi la aŭdantaron en la programo, eta debato estas antaŭvidita por akiri bonan prononcadon (korektante unu la alian laŭnecese).

INSTRUADO

La ĉefa aktivado de la klubo estas la instruado, ĉi-punkte notindas, ke nur la unuagrada kurso estas organizata nuntempe ĉe la sidejo de la Neregistara Organizo *Avolar*, kie deĵoras s-ro Roger MBUNGA. La supre menciita NRO, kies ĉefo estas s-ro Mbiya TEKADIOMONA Elvis, disponigis ejon, kiu utilas kiel klasoĉambro por la instruado de la lingvo Esperanto. 12 lernantoj regule partoprenas en la porkomencantaj kursoj, kiuj okazas ĉiu-sabate kaj -dimanĉe. La klubo planas organizi progresigajn kursojn por siaj malnovaj membroj dum la unua trimestro en januaro kaj marto 2018. Dank' al la sendo de la Lozera Esperanto-grupo, Verda Flago disponas diversajn lerno- kaj legomaterialojn, kiuj plifaciligas nun la Eo-instruadon kaj efike kontribuas en la plialtigo de la lingvoscio de la membraro. La tradicia metodo (la traduka el la franca Esperanten kaj inverse) estas la plej ofta kaj eĉ la ĉefa metodo uzata por la instruado de la lingvo de Zamenhof. Tial junulara kurso kun siaj akcesoraĵoj, tio estas kasedo, kompaktdisko, kaj suplemento, estas la plej larĝe uzata materialo por la instruado al novebakitoj.

Cours rationnel servos kiel lernilo por la duagrada nivelo okazonta dum la unua trimestro de 2018. Por la plialtigo de la lingvonivelo kaj -scio, aŭ kun la perspektivo de perfektigo, deflanke de la instruantoj, *Metodo 12* riveliĝis kiel bona perfektigilo. Krome, la nuna aŭ provizora gvidantaro opinias, ke pro manko de kompetentaj instruantoj regantaj la rektan metodon, nome la Cseh-metodon, la landa asocio DKEA (Demokrata Kongolanda Esperanto-Asocio) estu alvokita por organizi trejno-seminaron, en kiu povas partopreni du aŭ pli el la ĉi-tieaj instruantoj. Kun la paso de la tempo la provizora gvidantaro de Verda Flago pli detale raportos pri la supre menciita ĝemela kunlaboro inter la Lozera grupo (el la lozera regiono en Francio) kaj Verda

Flago. La klubo estas malferma kaj disponebla al la Lozera Esperanto-grupo kaj al DKEA, por ĉia kunlaborado, kaj pretas regule prezenti sian trimonatan agadraporton; plie, Verda Flago petas fortan atenton pri siaj aktivaĵoj.

Raportis: Arlain KIZEYDIOKO Mayinda, verdaflagoklubo@gmail.com

Kroatio

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj vigligis sian laboron

Sojle de la 110-a datreveno de Esperanto en Zagrebo (1908-2018), Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE) komencis novajn aktivaĵojn. Post la pasint-jara decembra partopreno en pluraj televidaj kaj radio-elsendoj kaj prezento de ekspozicioj en la zagreba biblioteko Slobodština (*Esperanto, la lingvo por la 21-a jarcento*) kaj en la Kroata lerneja muzeo (*Mia unua alfabetlibro*), bone startis ankaŭ la komuna agad-platformo de kroataj esperantistoj KRESKO (*KRoata ESperantista KOlegaro*), kiun kune iniciatis UZE kaj ĝia partnera organizaĵo Dokumenta Esperanto-Centro (DEC).

Post la bedaŭrinda ĉeso de la aperado de la presita gazeto *Zagreba Esperantisto*, posedita de UZE, en decembro 2017 UZE komencis eldonadi la retan gazeton *Kresko*, kiu



diskonigas la ideojn de la komuna agad-platformo de kroataj esperantistoj. Ĝis nun aperis kvin numeroj, kiujn oni distribuas al ĉirkaŭ 500 retadresoj tra la mondo. *Kresko* estas libere distribuebla kaj senkoste elŝutebla ĉe: www.esperanto-bjelovar.hr. Se vi volas regule ricevadi la gazeton de UZE, bonvolu sendi vian peton al ĝia oficiala retadreso, por esti aldonita sur la dissendoliston.

Ekde januaro 2018 startis prelegserio *Forgesitaj samideanoj*, kiu konsistas el ses prelegoj, okazantaj ĉiun lastan sabaton je la 11-a horo inter januaro kaj junio 2018 en la sidejo de UZE en Zagrebo, *Radnički dol 1*. Prelegas Josip Pleadin, kiu ĝis nun prezentis tri temojn: *Fran Kolar-Krom, fondinto de Esperanto-societo en Bjelovar kaj tradukinto de la unua romano el la kroata literaturo* (januaro), *Ilija Puhalo, la ĉefa figuro de la Internacia Asocio de la Fervojistaj Esperantistoj* (februaro) kaj *Ivan Matašin aŭ John Matasin, kroata elmigrinto en Sidnejo* (marto). Sekvas la prelegoj *Marinko Gjivoje, historiisto de Esperanto en Jugoslavio* (aprilo), *Bude Borjan, la unua viktimo de la ustaŝa teroro* (majo) kaj *Vilim Buk, presisto kaj eldonisto de La Suda Stelo* (junio). Bonvenas ankaŭ eksterlandaj samideanoj troviĝantaj en Zagrebo!

En decembro 2017 UZE iniciatis monokolektan kampanjon, kiu celas helpi al la nacia Esperanto-arkivo Dokumenta Esperanto-Centro finkonstruigi sian sidejon. Per vendado de BRIKO-kuponoj UZE aliĝis al la kampanjo *Por deca hejmo de DEC* kaj petas la esperantistaron helpi en la kolektado de la necesa sumo de 11.000 eŭroj por la ĉi-jaraj konstrulaboroj.

Pri ĉiuj aktivaĵoj de UZE bonvolu pli detale informiĝi pere de la gazeto *Kresko* aŭ ĉe la oficiala retadreso: zagreba.esperantisto@gmail.com

Marija JERKOVIĆ

Pollando

Varma vintra sesio en Poznano

Kiel kutime, komence de la jaro (inter la 3 kaj 10a de februaro) okazis la vintra sesio de la Interlingvistikaj Studoj en UAM, Poznano.

Alvenis 14 gestudentoj el 10 landoj (Ĉinio, Koreio, Brazilo, Usono, Turkio, Rusio, Francio, Hispanio, Germanio kaj Pollando).

Post la konsultiĝo kaj ekzamenoj, lunde komenciĝis la kursoj de la dua semestro: Michael Farris prezentis la ĝeneralajn regulojn de morfologio kaj sintakso eluzante la sciojn de la diverslingva partoprenantaro. Lidia Ligęza kaj Tomasz Chmielik enkondukis la studentojn en la duan periodon de Esperanta literaturo.

La multkultura konsisto de la grupo donis fekundan bazon al Ilona Koutny trakti diversajn flankojn de komunikado (la studentoj praktike povis kompari la diversajn korpolingvaĵojn). Ŝi gvidis kurson ankaŭ pri Esperanta gramatiko, kie la



interesiĝemaj studentoj povis ekkoni kaj diskuti la problemojn de Esperanta morfologio, inkludanta radikkarakteron.

La varma etoso montriĝis ankaŭ dum la komuna vespero: pluraj partoprenantoj prezentis poemojn, kantojn. Krom ili ankaŭ loka esperantistino Suzana Kornicka kantis kaj gitarludis.



La sesion sekvis sabata ekskurso al Toruno, kie post urborigardado kaj vizito de Studio P. en la Junulara Kulturdomo, Maria Pokrzywnicka prezentis en la Etnografia Muzeo la ĉiutagan vivon el la epoko de Zamenhof. Poste ŝi gastigis la gestudentojn per mielkuko kaj ludigis ilin kadre de la interkultura karnavala renkontiĝo. (Fonto: edukado.net)



Ilona KOUTNY, gvidanto de la Studoj
<http://www.amu.edu.pl/~inter/>

Svislando

Bela Suno en Villars-sur-Ollon (<http://www.beausoleil.ch/>)

La kolegio Beau-Soleil (Bela Suno) estas konata institucio en la kantono Vaŭdo, kiu lertigas 240 junulojn el la tuta mondo. Estas franclingva sekcio kaj anglalingva sekcio. Temas pri endoma studado kompreneble. En tiu lernejo laboras instruisto el Meksiko, kiu en sia junaĝo aŭdis pri EO. Kiam la tuta instruistaro preparis specialan programon pri novaj vojoj por la mondo por la sabato, la 24-a de marto, tiu instruisto proponis prezenton de EO. Li esploris en la Reto, vokis ien tien, kaj finfine vokis kaj trovis Mireille GROSJEAN. Feliĉe la dato proponita de li konvenis al ŝi kaj la afero estis decidita. Mireille sugestis, ke ŝi havu helpanton. Ŝi trovis Sonia Daubercies. Tiu duopo efike funkciis, Mirejo parolante kun LEGO-pecoj en la mano, rigardante al la publiko, Sonia skribante sur blanka tabulo.

En plej bela suna tago ariĝis la gestudentoj por konuma spektado de filmo: la parto pri EO de la filmo de Sam Green „Utopia in four movements”. Poste okazis prezento de EO al 5 grupoj per po 30-minutaj kunsidoj. Okaze de la kursetoj la studentoj atenteme partoprenis la prezenton de -in- kaj -id- kaj sukcesis post 5-minuta leciono trovi mem vortojn, kiuj ekzistas nek en la franca nek en la angla: kolombino, kolombido. Mireille insistis pri tiu „miraklo”. Kelkaj studentoj brile kontribuis per ĝustaj respondoj kaj ricevis donacojn. Pluraj geinstruistoj montris fortan intereson. La fina parto de la tago estas spektado de la filmo *Demain* (morgaŭ) de Cyril DION kaj Mélanie LAURENT, kiu prezentas novajn vojojn por agrikulturo. Mireille sendis antaŭe plurajn paĝojn kun ĝeneralaj informoj pri EO cele al fotokopiado kaj povis disdoni ilin al ĉiu studento fine de ĉiu kurseto.

Raportas Mireille GROSJEAN

Mia neforgesebla lingvoinstruisto

de Didier Apélété AGBOLO (Togolando)

Jam antaŭ ses monatoj mi eklernadis la internacian lingvon, entuziasme kaj precipe ĝoje, ĉar ĝi ebligis al mi, se ne komplete superi, almenaŭ egali miajn samaĝulojn, kun kiuj mi ĵus sukcesis en nacia ekzameno por eniri liceon, sed kiuj preskaŭ ĉiuj lernis Esperanton de pluraj jaroj en elementa aŭ meza lernejo. Mi do sentis tiun bezonon lerni Esperanton; tial mi enskribiĝis en ĵus kreita Esperanto-klubo.

Junie 1997 la nacia ILEI-sekcio okazigis someran seminarion. Dume mi konis sinjoron Raymond Yao AFANTCHAO, instruiston pri matematiko kaj naturaj sciencoj en kolegio, kiu okupiĝis pri la komencantoj, uzante rektan metodon por instrui Esperanton.

Kadre de tiu seminario li klarigadis al ni Esperantajn frazojn aŭ vortojn sen traduko al la franca lingvo, sed per gestoj aŭ kelkfoje per desegnaĵo surtabule. Tiu maniero instrui la lingvon estis tute nova malkovraĵo por mi neofito, kaj scivolema Eo-lernanto.

Dum dek du plenaj studtagoj miaj kono kaj progreso en la lingvo superis tion, kion mi havis dum la lastaj ses monatoj en la klasika instrumentado, kiun mi ne tute abomenis. Mi do povis sentime enmiksi min en konversaciojn kun eĉ pli spertaj esperantistoj dum minutoj uzante facilajn vortojn kaj stilaĵojn. Mi eĉ kapablis, helpe de nia kluba instruisto, ekinstrui ankaŭ en la klubo. Mire, mi uzadis la lernitajn metodojn de la seminario por miavice klarigi aferojn al samklubanoj.

Mi ĉefe memoras konsilon de sinjoro Afantchao: „Neniam serĉu traduki en la francan por kompreni, sed klopoĉu pensi en Esperanto”. Komence, tio estis malfacila, sed post du aŭ tri tagoj mi trovis tion tre avantaĝa. Ĝi gvidas al kreopovo de vortoj. Hodiaŭ, instruante la internacian lingvon, mi helpas min per la tiam lernitaj metodoj.

Mia plej grava sukceso estas, ke en la jaro 2000 mi sukcesis instrui Esperanton al kamarad-studento, sen skribi surtabule kaj sen postuli de li kopiadon surkajere, ĉar li ne havis tempon partopreni en la kluba kurso; nur per ofta konversacio en Esperanto dum niaj paŭzoj mi ebligis al li ekparoli Esperanton preskaŭ flue kiel iu kutima lernanto; mankis al li nur la skribkapablo, kiun kelkajn monatojn poste li lernis, kiam li mem esprimis la emon ekskribi Esperante; tiam instruante al li la alfabeton, mi klarigis al li la unikan interrilaton de sono kaj litero en Esperanto.

Mi tiam konvinkiĝis, ke eĉ analfabeto povas ene de kelka tempo lerni kaj paroli Esperanton.

Taksado de koheraj ideoj

NOMADKURSO KAJ ESPERANTO-PLUS

Ĉi tiuj estas du malsamaj vortoj kaj kreitaj de du homoj el la sama domo. Ĝi estas familio, kiu cerbumis pri ĉi tiuj du grandaj konceptoj. Miaflanke, mi aprezas iliajn kreajn ideojn, ĉar mi estis impresita ĉe mia alveno en Tanzanion. Ĉi tiuj du fervoraj esperantistoj, Evelyne ROTELLINI kaj Jean-Pierre MARCQ, provis doni al ni la klarigojn pri ĉi tiuj du konceptoj.

La unua koncepto estas la *Nomadkurso*: Ĉi tiu koncepto estis lanĉita de la franca esperantista sinjorino Evelyne Rotellini. Ĉi tiu termino venas de la du terminoj, kiuj estas: Nomado: signifanta *Nomade* franclingve kaj Kurso: signifanta *cours* franclingve. Se ni kunigas ĉi tiujn du terminojn, ni havos kombinan vorton „Nomadkurso”.

Ja estas kurso, ĉar ni vojaĝas kun instruisto, kiu preparis por ĉiuj pedagogian kajeron por progresanta akiro de la lingvo kaj malkovro de la lando, ĝiaj historio, literaturo, geografio, politiko, kutimoj.... Tiu instruisto daŭre respondas la demandojn, korektas kaj restas je la dispono de ĉiu.

NOMADKURSO EN TANZANIO 2018

La 11-an de januaro 2018: Alveninte en la ĉefurbon Dar es Salaam de Tanzanio, tuj ni iris al la plej bela loko nomata „Zanzibara Insulo”. Fakte ni vizitis Tanzanion dum la nomadkurso, sed la iniciatinto de ĉi tiu projekto klarigis al ni, ke temas nur pri simpla ekskurso, do, oni devis nur taksi renkontindajn lokajn geamikojn, vidindaĵojn, vivmanieron kaj koston de diversajoj (hoteloj, manĝaĵoj, vojoj ktp). Ĉi tiu nomadumado estis iniciatita de sinjorino Evelyne ROTELLINI kun aliaj amikoj.

Mi ne forgesos sciigi al vi, ke estas alia konceptita branĉo de s-ro Jean-Pierre Marcq (JoPo) nomata **Esperanto-Plus**. Ĉi-lasto ekzistas sendepende de „Nomadkurso”. Per la projekto Esperanto-Plus sinjoro Marcq sukcesis arigi francojn kaj aliajn nordulojn por regule subteni finance kvar afrikanojn, kiuj per tiu helpo povas plentempe labori por Esperanto, diskonigi ĝin kaj instrui ĝin.

Fakte, nomadkursaj renkontiĝoj estas projekto, kiu celas respondi je iuj bezonoj :

- Eviti la fenomenon de „eterna komencanto”. Tiam ni deziras enprofundiĝi

en la lingvon mem sed kion fari, sciante ke por bone paroli, skribi la lingvon, necesus viziti la landon mem. Eŭropanoj ŝatus viziti Afrikon, sed iom timas, preferus vojaĝi kun aliaj homoj, sed en iu aparta etoso, ne kiel turisto.
- Aranĝo al Afriko do, proponas vojaĝon, kiu inkluzivas Esperantan kurson, vizitojn al esperantistoj, al interesaj vizitindaj vivlokoj.

La krom-nomad'kurso (*kurso kaj vojaĝo*) al Tanzanio de 2018 kunigis dekduon da vojaĝantoj de Francujo, sed ankaŭ alilandanojn el Kongolando. Informoj haveblas ĉe ges-roj Marcq Rotellini: sunkompanio@wanadoo.fr. Celtravivi kune mirindan vojaĝon kaj flue paroli Esperanton ĉe la fino de la aventuro, jen la defio. La iniciantino Evelyne kaj ŝiaj geamikoj krome forte subtenas unuopajn projektojn en la kontinento kaj ili profitas foje siajn vojaĝojn al Afriko vizitante la surlokajn projektojn.

Mia taksado: Mi persone admiras kaj alte taksas ĉi tiun vojaĝplanon por Esperanto-Plus-anoj kaj aliaj en la respektivaj landoj sur la kontinento. Tiuj vizitoj al diversaj lokoj helpis min unue koni la nomadkursanojn, esperanto-plus-anojn kaj aliajn tieajn Esperanto-geamikojn el Tanzanio.

Raportas Honoré SEBUHORO el DR Kongo

Detaloj pri la nomadkurso

Okaze de telefon Alvoko mi povis pli precize scii pri tiu kurso aŭskultante Nicolas GAUFILET, kiu praktikis tian kurson dum dusemajna vojaĝo tra Pollando kaj kvarsemajna vojaĝo tra Madagaskaro. Jam en Marakeŝo, Maroko, trinkante marokan mentan teon kun Evelyne ROTELLINI, mi havis la unuan guston pri tiu interesa lern-situacio.

La partoprenantoj aliĝas al vojaĝo kaj al kurso, al komuna studema migrado. La instruisto devas unue kolekti informojn pri la vizitota lando. Aliaj fontoj estas ekzercoj el www.edukado.net, el www.lernu.net, tekstoj el www.eo.wikipedia.org k.s. Ludoj, konkursoj, eltiroj el „pomego”, la fama gramatiko, riĉigas la dokumentojn de la instruisto. La rikolto estas uzata por prepari kajeron, kiun ĉiu partoprenanto ricevas jam en la flughaveno antaŭ la ekflugo. Do malkovro de ĝia enhavo jam eblas en la aviadilo. La partoprenanto, vojaĝanto, turisto kaj studento, lernanto de Esperanto, povas legi tekstojn pri la cellando, povas fari ekzercojn, trovas blankajn paĝojn por verki pri la vojaĝo. Tion preparis la gvidanto antaŭ la vojaĝo, ligante gramatikon al sciendaĵoj pri la lando. La celo de tia metodo estas lerni Esperanton en migra kunteksto, kie mankas komputilo kaj vortaroj, ĉar la lernado okazas en buso, surstrate, en restoracio, en hotelo, en muzeo, side aŭ

stare... ie iam dum la tago. Aldoniĝas renkontiĝoj kun lokaj esperantistoj, kio ĉiam enorme kreskigas la motiviĝon de iuj lernantoj.

Kompreneble la vojaĝantoj ne havas la saman lingvonivelon; do la instruisto devas prepari dokumentojn de malsamaj specoj. La turistoj studemuloj havas la instruiston je dispono, iam ie, por starigi demandon kaj progresi en la lingvo. Ili povas memstare labori ĉu frumatene en la hotelo, ĉu vespere, laŭ siaj emoj. La kajero entenas ankaŭ blankajn paĝojn, kie la studento povas verki pri vizitita muzeo, pri impresa evento, pri kortuŝa renkontiĝo. Poste li/ŝi povas peti korektadon de la akompana gvidanto.

Se la grupo devenas el la sama lando kaj havas la saman denaskan lingvon, povas aperi tekstoj en tiu lingvo en la kajero. La intereso de tio estas, ke la studentoj povas traduki ilin al Esperanto. Unu persono povas ankaŭ deziri prezenti al la grupo verkaĵon personan kaj/aŭ tradukon faritan. Tiam kreigis klaso ie iam, sub arbo, sur benko, kaj la aliaj povas aŭskulti kaj komenti. Debato ekas. La instruisto grupigas kelkajn partoprenantojn de la sama nivelo por tiaj komunaj momentoj. Povas esti, ke en la karavano kunvojaĝas pli ol unu instruisto; tiam du grupoj povas samtempe studi en klaseca etoso.

La partoprenantoj ne nur lernas la lingvon, sed malkovras la landon paralele, do aliras al la loka kulturo. Substrekindas, ke la vojaĝo estas laciga kaj la lernado same. Do la instruisto devas konsideri tion kaj montri kunsentemon al sia lernantaro ; neniu postulo, neniu rigideco, neniu formala malpermeso pri krokodilado, amika kuraĝigo al provoj en la cellingvo. Ŝajnas, ke pli ol 80% de la kunvojaĝantoj partoprenas entuziasme kaj lernas bone.

Mi mem konstatis, ke promenado estas tre favora momento por praktiki lingvon kaj lerni. Paŝante silenti ne ĝenas, senparola momento eblas. Tio ebligas ian „digeston” de la aŭditaj frazoj, preparo de novaj frazoj, cerbumado, maĉado de gramatikaj aspektoj, kaj post kelkaj paŝoj la studento povas denove alparoli la instruiston kaj starigi demandojn aŭ submeti al la instruisto provojn. Temas pri tre favora lernsituacio. Oni tuj povas konstati, ke tia strategio nomita „nomadkurso” taŭgas por iu karavano, ofta situacio en nia movado. Senstreĉa kunvivado, eksterdoma promenado, proksima kontakto kun la instruisto, libera babilado, grupa etoso, tia pozitiva travivaĝo favoras bonan lernadon.

Noto: la priskribo de Honoré SÉBUHORO koncernas vojaĝon de Evelyne ROTELLINI, kiu ne estis nomadkurso sed preparvojaĝo al nomadkurso.

Mireille GROSJEAN

Du samtempaj AMO-seminarioj en Afriko

AMO 45 okazis ene de la 11-a Mezorienta Kunveno (MK) kun kvardeko da partoprenantoj en Marakeŝo, Maroko, fascina lando, kien iris MK kaj AMO por la unua fojo. En tiu lando estas kelkaj lernantoj kaj plurrilate favoraj kondiĉoj, lando kiu meritas de UEA kaj ILEI plian atenton. Sur la foto: seso da marokaj junuloj, kiuj povis partopreni en MK kaj sperti la internacian etoson de Esperanto.



En la samaj tagoj (martofine, aprileke), en Nyanza-Lac, en la sudo de Burundo, kunvenis 67 aktivuloj el diversaj provincoj de Burundo, DR Kongo, Tanzanio, Sud-Afriko kaj Zambio, por partopreni en la 3-a Burunda kongreso de Esperanto kaj en la 46-a AMO-Seminario. La programoj de tiuj aranĝoj estis gviditaj de spertaj esperantistoj el Burundo, DR Kongo kaj Sud-Afriko (la Kunordiganto de la Afrika Komisiono).

Oni spertis trejnadojn pri bona varbado, kiel fondi kaj disvolvi novan lokan E-klubon, pri financa evoluigo de lokaj kluboj aŭ kiel fariĝi finance memstara E-asocio, kiel organizi kaj diskonigi eventojn – movade kaj ekstermovade, strategioj por krei E-klubojn en lernejoj, kiel eluzi Esperanton en turismo aŭ komerco, kaj kiel organizi Esperanto-eventojn.

Okazis la Internacia Ekzameno de ILEI/UEA: por la elementa nivelo aliĝis 16 kandidatoj, el kiuj 10 sukcesis (kun 60%); por la meza nivelo aliĝis 6 kandidatoj el kiuj 3 sukcesis (kun 60%). Okazis kvintaga kurso por 66 komencantoj kaj inter ili 64 sukcesis en la fina ekzameno. Post la futbala ludo inter esperantistoj kaj loka veterana futbalista teamo, okazis balotado por la nova estraro de ANEB (la landa asocio), JEBUO (Junulara Esperantista Burunda Organizo) kaj BIS (la Burunda ILEI-sekcio).

Jérémie SABYUMVA

JAM REKORDA KONGRESO

ILEI havos sian kongreson de la 20-a ĝis la 28-a de julio 2018, do ĵus antaŭ UK en Lisbono. Unu tagon antaŭ ĝia komenco ekos samloke la tuthispana kongreso, kiu daŭros du tagojn. Tiel dum du tagoj ni havos komunan programon. Pro tio la aliĝintoj jam atingis la rekordan nombron de 150 en aprilo; plie la forta subteno de UEA (sendo de aliĝilo por la ILEI-kongreso kun la revuo ESPERANTO – diskonigo de gazetara komuniko pri la Esperanto Instruista Trejnado (EIT)) certe kontribuas al tiu rekordo. ILEI dankas al UEA.

Ĉirkaŭ 30 personoj aliĝis kaj anoncis prelegon, atelieron, ludojn, dancojn. Vendrede okazos simpozio kun altnivelaj prelegoj de niaj membroj kunlabore kun la gastiganta universitato kaj ĝiaj altnivelaj profesoroj: la poroj malfermiĝas al la ekstero, grava paŝo por ĉiuj. Okazos AMO-seminario kun du partoj: unu pri eksteraj rilatoj kaj unu pri transdono de konoj pri nia kulturo pere de EO-instruado.

Problemo estas nun la malsano de nia estrarano pri kongresoj, Radojica Petrović. Pro tio mankas la plej aktualaj informoj. Sed la aliaj estraranoj reagas kaj la kongreso evoluos tute bone. Paralele al la riĉa programo la Komitato de ILEI havos tri kunvenojn, kun elektoj de nova Estraro, okazos la fina parto de la Esperanto Instruista Trejnado (EIT) por deko da studentoj sub la gvidado de D-ino Katalin Kováts, oni prezentos la hispanan kaj katalunan lingvojn, okazos la kutima frandvespero, japana danco, lingva festivalo, literatura kafejo, pedagogia foiro kaj multo alia.

Tiu kongreso ebligos al la partoprenantoj lertiĝi, informiĝi, ekzerci, ekskursi kaj ekkoni novajn gekolegojn. Ne maltrafu ĝin !

Mireille GROSJEAN, prezidanto de ILEI

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (prez.), Mireille Grosjean (vicprez.), Christophe Chazarein, Mónika Molnár, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Rob Moerbeek.

Kontrolo: Simon Smits, Orlando Raola.

Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigja Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill. Estrare: M. Grosjean.

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny. Estrare: Mireille Grosjean.

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Goro Kimura, Ilona Koutny, Radojica Petrović, Kristin Tytgat. Estrare: Gong Xiaofeng „Arko”, Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 14)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Vítazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, *info@ikso.net*. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: *redaktanto@edukado.net*.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983, Trejnseioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, *zsafia.korody@esperanto.de*.

IFEF (Internacia Fervojiŝta Esperanto-Federacio): *vd. la Jarlibron de UEA*

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**.
Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Arina Osipova**.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, *www.uea.org*. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Mireille Grosjean**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Stefan MacGill**.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE (*Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo*) Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**,

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Mireille Grosjean**.

UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro**.

Unesko (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: **Monique Arnaud** (ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, *monique.arnaud@aliceadsl.fr*, **Jean-Pierre Boulet, Pascale Voldoire**.

kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 20 € en A-landoj (laŭ UEA-difino), **10 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj**, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. Kun aliro nur al la reta versio de *IPR* membreco kostas 10 € por la A-landoj, 5 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj. Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas paperan *IPR* kaj paperan *Juna Amiko*. Tio kostas por A-landanoj 32 EUR kaj por B-landanoj 18 EUR. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna amiko* akceptas abonojn enlande.

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Vilĉjo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Bv klare indiki la celon de via pago. La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni 5 € por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 24 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

* Retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

Redakciaj informoj

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende*. **Teknika helpo**: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, jozefo.nemeth@gmail.com, www.ilei.info/ipr/; tel: (+36-70) 931-0530. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE BEVERWIJK, Nederlando*, <moerbeekr@gmail.com>.

Ni fermis la nunan numeron la 15-an de aprilo 2018,
redaktofino por la sekva numero: la 15-an de aŭgusto 2018.



Granda sukceso por la Esperanto-kurso en Tel-Avivo (vd. p.24)



„Esperanto per rekta metodo“ en 40 lingvoj

Riĉe ilustrita lernolibro de Stano Marĉek, taŭga por kursoj kaj memlernantoj.

Ĝi jam aperis en 40 lingvoj: la angla, franca, itala, rusa, ĉina, japana, korea, portugala, pola, slovaka, taja, Esperanta, greka, nederlanda, irlandia, rumana, germana, dana, litova, serba, vietnama, norvega, luksemburga, hungara, serba, finna, ĉeĥa, hispana, ukraina, sveda, tajvana, armena, islanda, indonezia, turka, hinda, bulgara, latina, araba kaj latva.

La lernolibron akompanas didaktika materialo:

Instruaj bildoj por rektmetoda instruado (por la instruistoj, 500 kartonaj folioj A5 en du kofretoj, kiuj paŝo-post-paŝo sekvas la lernolibron – ankaŭ sur KD por projekcii la bildojn); KD Modela elparolo en mp3 (voĉlegitaj Esperantaj teksto + la lernolibro en diversaj lingvoj en pdf, por komputila uzo); Pekseso Esperanto (12 volumoj kun 288

bildoj el la lernolibro), **Aŭdo-vida konversacia kurso de Esperanto**, fabeloj de Andersen kaj la fratoj Grimm; krucecnimgoj; „apo“ (aplikaĵo) por telefonoj: www.iei.nl/apo.htm.
Pli da informoj ĉe: <http://katalogo.uea.org/> – aŭtora nomo „Stano Marĉek“ (131 titoloj).

